Marie Hankel,

La verda stelo

La bela verda stelo
kviete brilas jen.
Ĝi estas alta celo,
allogas nin ... kien?

Steleto kara, mia,
kion do volas vi?
La brila lumo via,
kion alportas ĝi?

La stelo bela, klara,
mallaŭte diras ĝi:
Mi petas, mia kara,
la fratojn amu vi!

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Marie Hankel *(nask. Dippe, ∗1844-02-02 – †1929-12-15).*

Arg-354-701 (2008-06-08 21:42:26)

Tiun ĉi poemon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Esperanto-Sangbogen", eldonita en 1941 de "Dansk Arbejder Esperanto-Forbund" (= Dana Laborista Esperanto-Ligo) kaj "Dansk Esperanto Selskab" (= Dana Esperanto-Asocio). En la unua strofo mi ŝanĝis la vorton "kvieta" al "kviete"; ĉar la adjektiva formo "kvieta" ŝajnas al mi malĝusta. (Oni eble povus kritiki ankaŭ la uzon de la artikolo "la" en la linio "La brila lumo via".)